

FALSA NUMERO DE LA
KONGRESA KURIERO
DE LA 73-A UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO

ŜERCO

ROTTERDAMO EN RETROSPEKTIVO

Rekorda kolera prezidanto, grandiozaj financaj truko, manko de revizorado, eskapaj respondoj de la Ĝenerala direktoro, retorikaj demandoj, lama diskuto. Jen kelkaj el la eblaj konkludoj de la diskuto pri la estrara raporto 1987, dum la unua Ĝenerala kunveno. Daŭre malpligrandiganta nombro de ĉeestantoj sekvis tiun elstaran programon. Spaktaklaj kolorŝanĝigoj en la vizaĝoj de kelkaj estraranoj ravis la atentan publikon, kiam demandoj estis starigitaj. Institucio Hodler '68 ricevis dum 1988 pli da atento ol iam antaŭe en sia historio. En ĝi oni librotitis, elspezis, enspezis, spezis, kvitancis, fakturis, notis, kontenturis, protokolis, komputis, nombradis ĝojante, ke oni finfine uzas tiujn lernolibre lernitajn vortojn.

Intertempe ĉeĵ Ar Weidmann, reprezentanto de la junularo, surmetinte vakeran ĉapelon rajdode perdis en la Nederlandaj ebenaĵoj por vane serĉi almenaŭ apuron de alia estrarano de TEJO. Tie li trovis nur eks-kursanojn: la nura vidbla junulo restis Silvia Piller, kiu dum la Nacia Vespero, por ne senti sin sola, vestis sin per robo, kiu igis ŝin dek kvin jarojn pli aĝa. Kvankam tio ne sufiĉis por preterpasi la aglimon de TEJO, ŝi tamen sukcesis elturniĝi inter monstraj estaĵoj kun enormaj piedoj kaj longegaj manoj, ĵus vojaĝintaj per SFEROJ el la ekstera spaco por festi la kaduk-jariĝon de UEA helpe de komputilaj tradukmaŝinoj kaj hungar-akcentaj parolsinteziloj. Same nekomprenbla parolsintezilo estis uzita por dubli la necenzuritajn scenojn de la filmo Mefisto: dum ĝia projekciado oni ne povis malambiguigi, ĉu la laŭtaj ronkaj bruoj apartenas al la son-trako, ĉu ili venas de la publiko.

Multaj tre interesaj programoj okazis samtempe, kaj oni povis admiri la miraklan jonglokapablon de ties gvidantoj, kiuj sukcesis lumrapide transportigi de unu salono al la alia por roli en la diversaj lokoj. Fine de la kongreso oni akceptis rezolucion, en kiu oni substrekas la neceson organizi elementan kurson de Esperanto por Akademianoj, enkonduki balon-entblovan alkohol-teston por prelegantoj dum IKU, rapide forgesi pri tiu ĉi kongreso kaj la ĉie svarmaj karaj gekulegoj. Ankaŭ fine de la kongreso la lastaj amasloĝejanoj sukcesis trovi sian blankardon kaj la roterdamaĵoj esperantistoj sukcesis reenveni siajn apartamentojn, kie gastoj el diversaj mondopartoj tavoligis ĝis plena stopigo de la ĉambroj. Amikoj el Afriko reiris en Afrikon kaj la normala vivo repranis sian fluon, ĉar fakte nenio grava estis okazinta.

NOVAJ ALIĜOJ

11237. CASTRO, S-ro Komandanto Fidel, adreso ĉe LKK de la 75a UK.
11238. JARUZELSKI, S-ro G-ło Wojciech, adreso ĉe LKK de la 72a UK.
11239. SPRINGSTEEN, S-ro Bruce, bendo-fako de LP-Koop, Svislando.
11240. MUSO, S-ro Miĉjo, adreso ĉe Musurba Oficejo de UEA.
11241. AKA, S-ro Demiano, Urba Prenezulejo, Neologurb, Kanadjo.
11242. JACKSON, S-ro Michael, bendofako de LP-Koop, Hongkongo.
11243. JACKSON, S-rino Judith, sama adreso.
11244. SERCZEDZ, S-rino Malzorgata, ul. Malbelega, Virŝova, Pollando.

11245. MUSO, S-ino Minjo, sama adreso kiel 11240 (la edzo suksis dungigi ankaŭ ŝin).
11246. TROWISEDZ, S-ino Nunzorgata, Rue des Cocus, Parizo, Francio.
11247. QFWQ, S-ro Tsubmul, Tria Kanalo maldekstre, Marso.
11248. EKSEDZIN, S-ino Memzorgata, Anyway Street, Novjorko, Usono.
11249. NEMERE, S-ro István, Naŭa Kanalo Maldekstre, Marso.
11250. ELAFRIKO, S-ro Amiko, adresonpetu de S-ro H. Bakker.
11251. ORANGO, S-ro Utango, adresonpetu prefere de la grupo "Kajto".
11252. ILERA, S-ro Rady, Radiofonia kanalo n-ro ???, Marso.
11253. TURING, S-ro Alan, salono Wuster, DLT, Kongresejo.

DEMENTOJ

Ni dementas, ke dum la aŭkcio estos aĉetebla la dikfingro de H. Tonkin. Fakte temas pri la piedfingro de la profeto.

Ni dementas, ke S-ino Eckhout, la dancistino de la Nacia (?) Vespero, finstriptizos en salono Lapanna.

Ni dementas, ke salono Lapanna estas la necesejo.

Ni dementas, ke d-ro Ulrich Lins intervjuigis de Radio Varsovio sen porti kravaton.

Ni dementas, ke d-ro H. Tonkin baldaŭ fariĝos profesoro brita (ili estas maloftaj profesoroj).

Ni dementas, ke nova komputila programo en la CO draste malplialtigos la nombron de duoblaj literoj en la jarlibro 1989 (=81).

Ni dementas, ke la ĉiuno sur la malantaŭa kovrilo de la libroserva katalogo ne inkluzivas sendokostojn.

Ni dementas, ke la Akademio de Esperanto respondoj viajn demandojn.

Ni dementas, ke la busan parton de la internacia ekzameno prizorgas dentokuracistoj.

Ni dementas, ke ĉiuj membroj de UEA jam konsentis kullabori kun la DLT-projekto.

Ni dementas, ke en kongrescentro "De Doelen" okazas la Veterana Kongreseto, dum la UK okazas aliloke.

Ni dementas, ke la filmo Mefisto oni dublis hungarlingven.

Ni dementas, ke la nombro de akuzativaj eraroj dum la Solena Malfermo estis pli granda ol en la pasintajn jarojn.

INAUGURA DILEMO

La salutanto far la Landa Asocio de Usono atentigas, ke dum la pasinta jaro la membraro de lia IA kreskis je 34%, dum la dolaro malkreskis je 16%. La ekonomistoj, li diris, ankoraŭ esploras ĉu estas rilato inter la du faktoj. Fine de la Jubilea Jaro, substrekis John Wells en sia festparolado, en la mondo "eksplozivas scienco". Ĉu niaj teoriistoj esploris ĉu tio iel rilatis kun la Jubileo de la Internacia Lingvo?

ANONCOJ

D-ro Ulrich Lins subskribos sian novan libron "La danĝera direktoro: persekutado de Esperantistoj en ties hejmoj" vendrede je la 15a horo en la Libroservejo.

Prof. d-ro Jan Knappert estas urĝe serĉata (morta aŭ viva) por fermi la kunvenojn de la Internacia Kongresa Universitato.

Prof. d-ro H. Frank subskribos sian novan kvin-voluman enciklopedion "Bazaj laborprincipoj de AIS". La nemalhavebla verko ampleksas pli ol 3200 paĝojn.

La transdono de Premio Maertens al la lingve plej memfida akademiano estos okazanta nur dum la malfermo de la venontan kongreson en Brittono, Britjo.

La limdato por omagiĝi dum la venonta UK estos la 15a de Decembro 1988 (dato de pruveble definitiva halto de ĉiuj korpofunkcioj). En kazo de via forpaso, bv. ĝustatempe informi pri tio la CO.

Tiuj, kiuj memoras la enhavon de la perdita statuto de Institucio Hodler, bv. alparoli rekte la koncernan instancan, petante cerbolavadon.

Novaj aliĝoj

- 2113 Scharf, S-ro Franz. Russengasse 16/6/31. A-3106 St. Polten, Aŭstrio.
2114 Ameye, S-ro Peter. Azalealaan 18, B-9100 Lokeren, Belgio.
2115 Vinck, S-ro José. Rue de Moha, 5, B-5800 Gembloux, Belgio.
2116 Simon, S-ro Allan K., 1339 Hamilton St. N.W., Calgary, Alberta, Kanado T2N 3W8.
2117 Matte, S-ro Guy. 7083 Notre Dame, Orléans, Ontario, Kanado K1C 1J1.
2118 Haltrecht-Matte, S-ino Merle. 7083 Notre Dame, Orléans, Ontario, Kanado K1C 1J1.
2119 Hegemann, D-ro Fritz. Ibener Strasse 27, D-6551 Fürfeld, FR Germanio.
2120 Pierquin, S-ino Camille. 4, rue de l'Eglantier, F-77160 Provins, Francio.
2121 Pierquin, S-ro René. 4, rue de l'Eglantier, F-77160 Provins, Francio.
2122 Cattaneo, S-ro Dante. Via Val di Ledro 23, I-20162 Milano, Italio.
2123 Canfarelli, S-ro Francesco. Via G. Mameli 120, I-37126 Verona, Italio.
2124 Canfarelli, S-ino Maria Grazia. Via G. Mameli 120, I-37126 Verona, Italio.
2125 Delchaye, S-ro Renato. Via Francesco de Mura 23, I-80029 Napoli, Italio.
2126 Pezeshki, Said, Kh. Valiasr, K. Abshar 56, Tehran 14347, Irano.
2127 Ōba, S-ro Atuo. 6-35-20 Honcho, Nakano-ku, Tōkyō, 164 Japanio.
2128 Ōba, S-ino Sigeko. 6-35-20 Honcho, Nakano-ku, Tōkyō, 164 Japanio.
2129 Erwich, S-ino M. Rozenstraat 13, NL-9421 RL Bovensmilde, Nederlando.
2130 Dale, S-ro John T., Jr. 2251 Pimmit Drive 730, Falls Church, Virginia 22043, Usono.
2131 Arciero, F-ino B., 7a Hof Street, Gardens, Cape Town-8001, Sud-Afriko.
2132 Thornton, S-ro G. A. D., 7a Hof Street, Gardens, Cape Town-8001, Sud-Afriko.
2133 Vervae, S-ro Eric E., Oude Heerweg 208, B-9100 Lokeren, Belgio.
2134 Lamba-Kifoto, Mafulu. 4 Esplanade Maurice Thorez, F-95100 Argenteuil, Francio.
2135 Sackey, S-ro Cameron. P.O. Box 932, Mamprobi-Accra, Gano.
2136 Boorsboom, S-ro Eduard. Ds. Sanderuslaan 20, NL-3732 ET De Bilt, Nederlando.
2137 Siurawski, S-ro Marek. Korotyńskiego 21/92, PL-02-123 Warszawa, Pollando.
2138 Natabou, S-ro Benoît. B.P. 06-1855, Cotonou, Benino.
2139 Mafuta, S-ro Wina. Popokabaka A/19, B.P. 11.266, Kinshasa I / Kalamu, Zairio.
2140 Chateau, S-ino Micheline. La Tuilerie de Seveux, F-70130 Fresne St. Mames, Francio.
2141 Pons, S-ino Yvette. Centre Hospitalier, Mail Pierre Charlot, F-41016 Blois, Francio.
2142 Knappert, Prof. Jan. 40 Fitzjohn Avenue, Barnet, Herts., Britio EN5 2HW.
2143 Mulas, S-ino Maria Antonia. Via Loreto 6, I-24100 Bergamo, Italio.
2144 Borovsky, S-ino Cilla. Dinnye u. 5, Budapest XI, Hungario.
2145 Tatajthyi, S-ro Tomas. Disztér 8, H-1014 Budapest, Hungario.
2146 Duyves-Damhuis, S-ino Veronica. Hertshoovweg 2, NL-1861 XD Bergen (NH), Nederlando.
2147 Andersson, S-ro Arne A. E., Källedid 3021, S-441 96 Alingsås, Svedio.
2148 Kohári, S-ro István. Thälmann u. 31, H-1138 Budapest, Hungario.
2149 Nádas, S-ino Magdolna. Sasfiók u. 2, H-1124 Budapest, Hungario.
2150 Nádas, S-ro Peter. Sasfiók u. 2, H-1124 Budapest, Hungario.
2151 Zsoldos, S-ro László. Somló út 50/a, H-1117 Budapest, Hungario.
2152 Grilli, S-ro Franco. Via Podgora 12, I-41037 Mirandola, Italio.
2153 Grilli, S-ro Giorgio. Via Podgora 12, I-41037 Mirandola, Italio.
2154 Chong, S-ro Jong-hoon. CPO kesto 4258, Seoul, Korea Resp.
2155 Kat, S-ro M. J. E., Boliviadreef 88, NL-3563 GM Utrecht, Nederlando.
2156 Wauters, S-ino Hilde. Gentse Steenweg 108, Aalst, Belgio.
2157 Hill, S-ino L. Esslemont House, 30 High Street, New Town, Uckfield, East Sussex, Britio TN22 5DD.
2158 Šolt, S-ro Cvi. Doar-Na Maale-Hagalil, IL-25 130 Gaaton, Israelo.
2159 Hensel, S-ro Moshe. 10 Petaĥ-Tikva-str., IL-58 337 Ĥolon, Israelo.
2160 Tahira, Amiko. Kume-tyō 656, Husimi-ku, Kyōto-si, 612 Japanio.
2161 Tahira, S-ino Masako. Kume-tyō 656, Husimi-ku, Kyōto-si, 612 Japanio.
2162 Sharman, S-ro Frank W. 6 Totland Grove, Chester, Cheshire, Britio CH2 2EY.
2163 Manzi, S-ro Renato. Via Settimio Severo Caruso 26, I-80129 Napoli, Italio.
2164 Swenker-Boersma, S-ino Hanneke. Bottemaheerd 51, NL-9737 NA Groningen, Nederlando.
2165 Swenker, S-ro Johan. Bottemaheerd 51, NL-9737 NA Groningen, Nederlando.
2166 Zanin, S-ro Pierre. Via Ponte Ardo 44, I-32026 Mel (Belluno), Italio.
2167 Rowe, S-ro Charles Edward. 56A Vicars Moor Lane, Wichmore Hill, London, Britio N21 2QH.
2168 Uemura (Rowe), S-ino Naoyo. 56A Vicars Moor Lane, Wichmore Hill, London, Britio N21 2QH.
2169 Haruo, S-ro Akira. p/a Oomoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-ku, 621 Japanio.
2170 Micuno, S-ro Masaburo. p/a Oomoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-ku, 621 Japanio.
2171 Kawai, S-ro Tosiuyuki. p/a Oomoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-ku, 621 Japanio.
2172 Macuda, S-ro Tacuo. p/a Oomoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-ku, 621 Japanio.
2173 Molenaar, S-ro G. B. G. J. Mulderstraat 62a, NL-3027 RJ Rotterdam, Nederlando.
2174 Skorčeva, D-ro Veselina Ĝeliazkova. Bul. "Karl Marks" 36A, BG-9000 Varna, Bulgario.
2175 Wilbert, S-ro Gerhard. Kirchenstr. 2, D-6657 Gersheim 2 - Reinheim, FR Germanio.
2176 Melchers, S-ino Barbara. Liniestr. 104, D-4000 Düsseldorf 1, FR Germanio.
2177 Vivier, S-ino Raymonde. Route des Pétoles, F-14600 Honfleur, Francio.
2178 Krans-Verdouw, S-ino C. A. v. d. Populierendreef 100, NL-3137 CW Vlaardingen, Nederlando.
2179 Koolhoven, S-ro Wim. Rembrandtlaan 125, NL-7545 ZJ Enschede, Nederlando.

Prefaco

estas kutime malpli longe ol ĉapitro. Tiu ĉi celas nur anonci al vi la ĉi-jaran kongresan ĵurnalon, kiu ekde sabato aperos dupaĝe kaj artikolplene. Kaj la nomo? Tio kompreneble estas omaĝo al la CO (Centra Oficejo) de UEA, jam pli ol 30 jarojn en Roterdamo. Tie oni produktas tiun ĉi gazeton — kiu, cetere, povos plene speguli la kongreson nur se kontribuos kaj aktive helpos energiaj kongresanoj. Bonvolu liveri tekstojn kaj anoncojn, kaj eventuale vin mem, al la UEA-oficejo en la kongresejo.

KIEL VIN DISTROS ROTERDAMO?

La **bazaro** (manĝaĵoj, vestaĵoj, floroj k.a.) okazos marde kaj sabate, en Mariniersweg apud la kub-loĝejoj (n-ro 8 sur la urba mapo en via dokumentujo). En tiu sama regiono vi trovos la urban bibliotekon, kiu enhavas ekspozicion pri Esperanto ĉe la tria etaĝo. Esperantajn librojn vi trovos sur la unua etaĝo. La biblioteko estas malferma inter 09h kaj 21h de lundo ĝis vendredo. Sabaton vi povos viziti ĝin inter 10h kaj 17h.

Ekspozicion pri mondiaj religioj, kun klarigoj ankaŭ en Esperanto, vi trovos en **Laŭrenspreĝejo** (aŭ Granda Preĝejo), proksime de la biblioteko. Ekster la eŭkumena diservo dimanĉon, ĝi estos vizitebla de 10h ĝis 16h mardon, merkredon, vendredon kaj sabaton. Jaŭdon la preĝejo estos malferma de 12h ĝis 14h.

Filatelistoj povos aĉeti, vendi aŭ interŝanĝi kun nederlandanoj poŝtmarkojn dum la **poŝtmarka foiro** mardon kaj sabaton antaŭ Laŭrenspreĝejo.

Lastjare konstruiĝis en **Dr. Zamenhofstraat** kvartala domo. Artisto John Wouda pentris grandan murornamaĵon en la ĝardeno, kun d-ro Zamenhof kaj Esperanto kiel temo. La kvartala domo estos malferma nur mardon de 10h ĝis 12h (pro ferioj).

De la stacidomo vi povas veturi tra la urbo

per **vaportramo**. Bileton vi povas aĉeti en la tramo kontraŭ 3 guldenoj.

En la parko apud la Eŭromasto vi trovos du interesajn aferojn, nome la **norvegan lignan preĝejon** kaj belan **ĝardenparketon**. Petu ĉe la deĵorantino de la norvega preĝejo, ĉu vi rajtas rigardi ĝian internon. La ĝardenparko troviĝas ĉe la rando de la parko kontraŭe al la flanko de la Eŭromasto. Promenante sur la digo tie vi trovos ĝin; ĝi nomiĝas **Schoonoord**.

Meze de la urbocentro altiros vian atenton granda verda konstruaĵo, kiu altas 90 metrojn. Ĝi estas la **Monda Komerca Centro**, nove konstruita sur la sama loko kie, antaŭ la detruo de Roterdamo en majo 1940, situis la tiama "Borso". Se vi havas antaŭ, dum aŭ post la kongreso iom da libera tempo, vizitu ĝin. Iru al ĝia 23-a etaĝo kaj belega panoramo de la urbo ĝuigos vin.

Nur du semajnojn antaŭ la kongreso, malfermis la pordojn luksega **subtropika naĝejo**. "Tropikana" situas apud la rivero ĉe Maasboulevard 100, maldekstre de la granda urba ponto kaj proksime de la kub-loĝejoj. La allogaĵoj inkludas akvoglitejojn, torentejon, varmajn kirlobanejojn ktp. Trihora bileto kostas 11 gld., aŭ 17,50 dum la semajnfino. Se vi ŝatas naĝi aŭ ludi en la akvo, nepre rezervu tri horojn de via tempo.

Internaciaj Ekzamenoj de UEA-ILEI

Dum la UK en Roterdamo (simile kiel dum la UK en Varsovio), okazos la Internaciaj Ekzamenoj de UEA-ILEI laŭ du ekzamen-niveletoj: elementa ekzameno (EE) kaj meza ekzameno (ME).

La **skribaj** EE kaj ME samtempe okazos **marde** la 26-an de julio en la salono Szerdahelyi.

La **parolaj** EE kaj ME okazos **ĵaŭde** la 28-an de julio.

Jen la detala horaro:

Mardon, la 26-an: 9.00-10.00h, akcepto de aliĝkotoj en la salono Szerdahelyi; 10.00h, komenco de skribaj ekzamenoj.

Ĵaŭdon, la 28-an: 9.00h, komenco de parolaj ekzamenoj en la salono Szerdahelyi.

La aliĝkotoj por la ekzameno estas 40 guldenoj (aŭ egalvaloro) kaj por EE kaj por ME.

Cseh-seminario

ATENTON! Cseh-seminarianoj *nepre* ĉeestu lunde (9.00h) la unuan lecionon de la Cseh-kurso por komencantoj.

Muzea Postkongresa Ekskurso 30 julio - 2 aŭgusto

La aŭtobuso, kiu veturos ĉiutage al unu el la famaj nederlandaj muzeoj, ankoraŭ ne estas tute plena.

Sabaton posttagmeze, la 30-an de julio, oni vizitos en Roterdamo la **Muzeon pri Etnografio**. Gvidos s-ino M. Vermaas, iama direktoro de la CO de UEA. Ĝi cetere gvidos ankaŭ la sekvajn tagojn, kiam oni ĝuos en Otterlo la famegan muzeon Kröller-Müller kun ĝia kolekto de pentraĵoj de Vincent van Gogh. Tuj apude troviĝas la tre vizitinda kaj unika Statuparko.

Lundon kaj mardon la pentroarto de Frans Hals, Rembrandt kaj pluraj aliaj nederlandaj famuloj estas en la programo.

Petu detalajn informojn ĉe la ĝiĉeto Ekskursoj.

4-taga Postkongresa Naturekskurso sur la insulo Texel

Al tiu ekskurso, celita speciale al bird- kaj plantŝatantoj, oni povas ankoraŭ aliĝi. Por nur kelkaj personoj restas hotelĉambro en la centra vilaĝeto de tiu birdoriĉa insulo.

Se vi kapablas ĉiutage bicikli 20-30 km (aliaj ebloj por transporto ne ekzistas), ŝatas observi amason da birdoj, ĝui la trankvilon de la biciklaj vojoj, enspiri freŝan aeron, anoncu vin ĉe la ĝiĉeto Ekskursoj.



VI TROVOS...

...vian Kongresan Sakon preskaŭ tiel informplena, kiel estas la Kongresa Libro. Certe tuj utilos al vi la **roterdama prospekto** kaj la informoj pri la **restoracio Engels**. Verŝajne helpos vian planadon la **aliĝiloj** de la UK en Brajtono (1989) kaj de la Pariza Frenza Semajno (1989), dum stimulos vian pli distancan revadon la Unua Bulteno de la Havana UK (1990). En diversaj kontraŭaj direktoj tiros vin partituro de la popularaj kantoj **Bonvenon** kaj **Ĝis Revido**, specimena numero de **Literatura Foiro**, alvoko kontribui al **Fonduso Zagreba Metodo**, alvoko kontribui al la porblindula **Agado E3**.

Se vi legas angle, eble kaptos vian atenton la antaŭanonco pri **Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages**, projekto kunordigita de la nederlanda firmao BSO. Kaj, se vi *ne* legas nederlande, **Esperanto Vandaag** estas ĝisdata informfolio, kiun vi povas disdoni al scivolemuloj se vi volas partopreni unu el la ĉefaj laboroj de Universala Kongreso: informi pri Esperanto la publikon en la kongresa lando.

ANONCETOJ

Radio Rijnmond (la loka radiostacio en Roterdamo) prizorgas **novaj-elsendojn esperantlingvajn ĉiutage de 18h55 ĝis 19h00**. *Ne* estas novaĵoj pri la kongreso, sed pri mondaj kaj lokaj aferoj. Prizorgas la elsendon la amsterdama esperantistino Korine Cheizoo.

Ne koleru se vi aŭdas **krokodilajojn** dum ĉi tiu UK! *Ne*-esperantistoj povas kaj rajtas partopreni la kongreson kontraŭ 35 gld. tage.

Eble okazos **televiĉ-elsendo** pri la kongreso, merkredon la 27-an en la elsendo "Nieuws-lijn" de la granda nederlanda reto Veronica inter 21h20 kaj 22h10.

AVERTO: Estu atentigita pri la fakto, ke troviĝas multaj ŝtelistoj en la ĉirkaŭaĵo de la stacidomo kaj De Doelen. Ni rekomendas ke, por esti sekura, vi tuj elspezu vian monon en la kongresa Libroservo (kien cetera la ŝtelistoj kredoble ne venos).

DANKON!

Jen daŭrigo de la listo sur paĝoj 11-13 de la Kongresa Libro, de kongresanoj malavare donacintaj al niaj bonfaraj kaso.

Literatura Kaso

Britio
S-ro Bruno Najbaro
S-ro Eric W. McCanlis
S-ro Martyn Hugh McClelland
S-ino Mary Kathleen Najbaro
S-ro William H. Simcock
Finnlando
S-ino Heta Kesälä
Francio
S-ino Louise Marin
FR Germanio
S-ino Elise J. F. Woller
S-ro Heinz Schindler
S-ino Elisabeth Müller
S-ro Rudolf Reisel
Sebastian Sommer
S-ro Werner Heinrich
Honkongo
S-ro Siu Hung Ĉu
Nederlando
S-ino A. J. Jung-Schroder
S-ino G. J. Rodenhuis-Boll
Inĝ. Jan van der Marel
S-ino Rie van der Kooij-Waal
S-ro A. P. G. Ploeg
S-ro Willem Grapendaal
Usono
Prof. Eugene H. Thompson, Jr.

PROGRAMŜANĜOJ

tutsemajne:

La pupteatraĵo **Dekamerono 8,5**, kiu okazos kvarfoje dum la semajno, translokiĝis al salono Hodler. La unua prezento okazos sabate je 20h00.

lundo 25:

La dua parto de la Tago de la Lernejo (14h-16h30) translokiĝis al salono Hodler, dum la samtempa kunsido de **Oomoto iris al salono Grabowski**.

VETURADO KAJ SENPAGA DISTRIĜO EN ROTERDAMO

Tiuj, kiuj mendis kaj ricevis **tutsemajnan urboveturan (RET-) bileton**, devus skribi sur ĝi sian nomon en la indikita loko. Bileto, kiu validas por pluraj veturoj per buso, tramo aŭ metroo, estas aĉetebla en la stacidomo (ĉe normala ĝiceto): ĝi nomiĝas **strippenkaart** (elparolu *stripenkart*; = "striobileto") kaj kostas 8,65 gld. Detaloj pri ĝia uzo troveblas sur paĝo 9 de la Dua Bulteno.

Se vi ne jam mendis **tuttagan ekskurson** por merkredo, restas ankoraŭ kelkaj lokoj en ĉiuj krom DE5 (al Delft). Rezervu lokon ĉe la ĝiceto Ekskursoj.

Se merkrede vi restos en Roterdamo, estas utile scii, ke vi rajtos senpage eniri ĉiujn urbajn muzeojn dum tiu tago. Por **arto** (antikva ĝis moderna) vizitindas la Muzeo Boymans-van Beuningen; por **historio**, la Dubbelde Palmboom (en Delfshaven, atingebla per la metroo aŭ tramlinio 4); por **allandaj kulturoj** elstaras la Muzeo pri Etnologio kaj pri **maristaj aferoj** la Marista Muzeo Prins Hendrik. Detaloj pri tiuj kaj aliaj vizitindaj lokoj troviĝas en la urba prospekto kun mapo en via dokumentujo.

En la forira semajnfino de la kongreso, okazos "**franca festivalo**" ĉe la malnova haveno apud la kub-loĝejoj. Por tiuj kongresanoj (ekzemple komitatanoj) kiuj restos iom pli longe en la urbo, jen interesa maniero pasigi sabatan vesperon.

Ĉiun dimanĉon de 13h ĝis 17h30 vi povas senpage ĉeesti **subĉielan artprogramon** en la ĝardeno kaj rozoparko malantaŭ la Muzeo Boymans. Temas pri kantoj, muziko kaj teatro.

Kariljonan (sonorilan) **koncerton** vi povas aŭdi dimanĉon la 24-an de 10h30 ĝis 11h30 ĉe Laŭrenspreĝejo, lundon la 25-an de 12h00 ĝis 13h00 ĉe Laŭrenspreĝejo aŭ la urbodoma korto, kaj mardon la 26-an de 12h00 ĝis 13h00 ĉe la urbodoma korto.

Por pliaj distraĵoj en Roterdamo, vidu ĉe **Prefaco**, la "antaŭnumero" de la Kongresa Kuriero, kiu aperis vendrede.

Komenco

Ĝi vere estas, tiu ĉi unua numero de la roterdama Kuriero. Ĝi aperas en tago, kiam eksvarmas en la kongresejo multlanda popolo, kiam ekkreiĝas tiu unika etoso konata al ĉiu esperantisto. Etoso de interkompreno kaj kunagado — kiu ŝvebas ankaŭ en la CO de UEA, kvankam ne sen fojfoja interrompo. Sed ni estas nur homoj — do, bonvolu pacienci dum la unuaj kongresaj tagoj, se io iel iam misas.

Interkoniĝu bone!

La kongresa programo — Kion spekti, kion partopreni?

Ĉu vi alvenis, registriĝis, trovis vian loĝlokon, ekfoliumis la enhavon de via dokumentujo ... kaj tuj komencis malorientiĝi en la amasoj da programeroj, informoj, proponoj, konsiloj? Jen tial eta superrigardo pri la fruaj kongresaj aranĝoj, por helpi al vi ne maltrafi ion gravan.

Ĉiuj kongresanoj verŝajne ĉeestos la **Solenan Inaŭguron**, dimanĉon de 10h00 ĝis 12h00 en salono Zamenhof. Tiu tradicia kongresa malfermo estos cetera pli interesa kaj movada ol kutime, ĉar ambasadoroj kaj aliaj moŝtuloj venos anstataŭe al la Jubilea Festo en mardo. La **Interkona Vespere**, sabaton vespere en Faulhaber (la centra kongreseja spaco), same estas aranĝo celata al ĉiuj, por helpi al vi hejmiĝi en la kongresa etoso. Kaj hejmiĝon en la kongreslando proponas la **Nacia Arta Vespere**, dimanĉon de 20h00 ĝis 21h00 en salono Zamenhof.

Pri la kongreslando temas ankaŭ aliaj aranĝoj: la **Foiro de Nederlandaj Metioj** en la vestiblo dum tuta sabato, la tradicia lingvokurso, **La Nederlanda Eksprese** (la unuajn tri kongresajn tagojn je diversaj horoj en Isbrücker), kaj serio de kvin **Prinederlandaj Prelegoj**, per kiuj vi povas lerni pri la ŝtata sistemo, popolo, socia helpo, kulturo kaj historio de la Malaltaj Landoj. La prelegoj okazas je 17h00 de dimanĉo ĝis vendredo escepte merkredon, en salono Drees.

Movadaj **aktivuloj** certe volos ĉeesti la **Movadologian Simpozion** en salono Hodler, kiu okazas sabaton de 9h00 ĝis 15h00: Konataj kaj malpli konataj movadanoj prezentas kaj diskutigas ideojn por plibonigi la agadon de UEA kaj la landaj asocioj. La samaj homoj devus partopreni la **Unuan Ĝeneralan Kunsidon de UEA**, dimanĉon de 14h00 ĝis 16h30, kie oni diskutos la agadon de la pasinta (jubilea) jaro. Kaj lunda mateno proponas amaseton da movadaj temoj, de landa agado en salono Drees, tra terminologia kaj faka agado en Szerdahelyi, ĝis eksteraj rilatoj en Isbrücker. Aparte interesaj povus esti la kunsido en Hodler por la **Bjalistoka Centro** (kie la iniciatinto, prezindanto de la pola parlamento Roman Malinowski, ĉeestos por respondi demandojn) kaj la kunveno **Agado en Afriko**, kie eblos rekte paroli kun kelkaj reprezentantoj de tiuj junaj landaj movadoj.

Kulturamantoj nepre ne maltrafos la inaŭguran prelegon de la Internacia Kongresa Universitato, dimanĉon je 16h30 en Grabowski: **William Auld** — poeto, redaktoro, kritikisto, edukisto — prezentos sian perspektivon pri la Esperanta poezio el la lastaj du jardekoj. Malfeliĉe samtempe la kunsido de Esperantlingva Verkista Asocio, sed vi havos okazon renkonti famajn aŭtorojn tra la semajno en la Libroservo, kien ili foje venos por subskribi siajn librojn.

Pli da kulturo troviĝas en la komenco de la arta programo. Plej frue debutos **Dekamerono 8,5**, en la unua de siaj kvar prezentoj dum la semajno: sabaton je 20h00, en salono Hodler (kaj ne en Grabowski, kiel indikas la Kongresa Libro). Por ĉeesti tiun multfoje premiitan, erotike spritan verkon, vi bezonas preni senpagan bileton de la ĝiceto Arto. Plia verko tute nova al esperantistoj estas adapto de plej malnova: **La neĝa blovado** de Puŝkin, kiu aperis en Esperanto jam antaŭ cent jaroj. Ĝin freŝe prezentos Kazimierz Mazur, populara pola aktoro, trifoje dum la semajno — unue dimanĉon je 17h00 en salono Lapenna. Plene profesiaj estos tiuj polaj enkondukoj al la semajna artmenuo.

NEDERLANDO BONVENIGAS VIN PER LIBROJ

filozofio	biografio	popularscienco
Erasmus:	Bouhuys:	De Brabandere:
<i>Laŭdo de l' stulteco</i>	<i>Anne Frank ne estas de hieraŭ</i>	<i>Infoduktoj — nova vorto, nova futuro</i>

MALKOVRU ILIN KAJ MULTON PLI ĈE LA LIBROSERVO

KONGRESA KURIERO, UNUA NUMERO (SABATO-DIMANĈO)

Bleicher-Eldonejo prezentas:

LA Ulrich Lins DANGERA LINGVO

mejloŝtona verko pri
la historio de Esperanto.

Legiĝas kiel streĉa romano, tiu ĉi pli ol 500-paĝa "studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto". La plej fruajn kontraŭjuĝojn, la nazian subpremon, la ekstermon en Stalina Sovetunio kaj aliajn politikajn atakojn en Okcidento kaj Oriento amplekse analizas kaj piednotas la konata germana esperantologo.

Mezdu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto (66.00 gld) plus sendokostoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

POKALO "ESPERANTO" ATENDAS VIN!

Restas ankoraŭ kelkaj lokoj ĉe la kongresa **Bankedo**, kiu okazos lundon vespere en luksa tegmenta festsalono de la restoracio Engels. Bilettoj 75 gld. ĉe la koncerna ĝiĉeto.

Novaj aliĝoj

- 2180 Chrdele, Ing. Petr. Lidická 941, 252 28 Černošice, Ĉeĥoslovakio.
- 2181 Coslovi, S-ino Sofia. Via dei Porta 9, 34141 Trieste, Italio.
- 2182 Wagemans, S-ro Peter. Doornbosheerd 62, 9737 MR Groningen, Nederlando.
- 2183 Nxingui-Kanga, S-ro Fregonara Baldas. s/c Pembele José, C.P. 3317, Luanda, Angolo.
- 2184 Rish, S-ino Ethel. 2569 W. Argyle, Chicago, Illinois 60625, Usono.
- 2185 Karajan, S-ino Asja. Kompleks Ĉajka, bl.13, vh.G,I et ap.8, 9005 Varna, Bulgario.
- 2186 Karajan, S-ino Markrid. Kompleks Ĉajka, bl.13 vh.G,I et ap.8, 9005 Varna, Bulgario.
- 2187 Kančeva, Nadejda Ivanova. Aleko Bogoridi 1, 5300 Gabrovo, Bulgario.
- 2188 Tiņova, Sonja Dimitrova. Ĉardafon 2, 5300 Gabrovo.
- 2189 Keitel, S-ro Jürgen. Gutshof Waldschwind, Geusfeld, 8602 Raunebrach, FR Germanio.
- 2190 Pliha, S-ino Mária. Iparvasut u. 31, 1182 Budapest, Hungario.
- 2191 Rytenberg, Ing. Eugen. Gläntstigen 4, 752 56 Uppsala, Svedio.
- 2192 Englund, S-ro Paul Michael. Love Almqvistsv. 8, 112 53 Stockholm, Svedio.
- 2193 Schallenbergh, S-ro Ward. J. Lemmensstr. 4, 2970 Boortmeerbeek, Belgio.
- 2194 Fantom, S-ino Helen. 92, Enborne Road, RG14 6AN Newbury, Berks., Britio.
- 2195 De Geus, F-ino Liesbeth. Kerkhoflaan 9, 7913 VV Hollandscheveld, Nederlando.
- 2196 Lin Bo, S-ro. Post Box 2, Hefei, Ĉinio.
- 2197 Kane, S-ro Daniel. Dept. of East Asian Studies, University of Melbourne, 3052 Parkville, Aŭstralio.
- 2198 Felsó, S-ro Géza. Péter-Pál utca 27, 1221 Budapest, Hungario.
- 2199 Valadas, S-ino Ana Maria. Calçada dos Mestres 65, 1000 Lisboa, Portugalio.

NEDERLANDO: MUELEJA LANDO

Okaze de la 73-a Universala Kongreso en Roterdamo aperis traduko de belega broŝuro kun informoj pri nederlandaj muelejoj. Ĝi enhavas 32 paĝojn, riĉe ilustritajn per kolorbildo. La eldonado okazis en kunlaboro kun Nederlanda Esperanto-Asocio.

Jam en antikvaj tempoj la homo serĉis fontojn de energio por faciligi sian vivon. Antikva fonto de energio estas la vento.

Ventmuelejoj ne estas nederlanda inventaĵo, tamen en tiu ebena kaj ventoriĉa lando la uzo de la vento por akiri energion atingis tre altan nivelon. Muelejojn oni ne nur uzis por dreni polderojn kaj por mueli grenon, sed ili estas antikva formo de industrio, kies fino venis nur en la komencaj jaroj de la nuna jarcento. En Nederlando ekzistas ankoraŭ ĉ. 1000 muelejoj, kaj ĉiu el ili estas monumento pri antikva tekniko, kiun oni zorgoplene konservas kaj protektas.

La broŝuro ne nur estas bona memorigilo por tiuj, kiuj vizitis Nederlando, sed eĉ nederlandanoj mem trovas en ĝi interesajn informojn.

Kvankam la mondo kredeble ne urĝe bezonas tion, kiel kromprodukto dum la tradukado kreskis kvinlingva terminaro, en Esperanto kaj la lingvoj angla, franca, germana kaj nederlanda.

Nederlando, mueleja lando haveblas ĉe la Libroservo je rabatita kongresa prezo.

JKH

Pritrakto de la kongresa temo

"Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo" — Kion tio signifas por ni, esperantistoj? Jen kelkaj pensoj, kiujn eventuale pritraktos diskutrondoj kaj debatoj dum la kongresa semajno:

- En la 60-aj jaroj emfaziĝis, ke la scienco servu al la socio (kaj esperantistoj, de CED ĝis TEJO, samopiniis).
- Oni kvazaŭ demandis, "Kion Reĝo Scienco faru por ni, Liaj humilaj regatoj?"
- La malreĝema hodiaŭo levas novan demandon: "Kiel ni, la publiko, rilatu al la scienco?"
- Akrigas la demandon pruvoj de la kontraŭvivaj kapabloj de scienca progreso.
- El la spertoj de la Esperanto-movado eble venas konsiloj por la homa-sciencia kunviviĝo.

La programo por tiu pritrakto estas jena:

dimanĉo 24:

Solena Inaŭguro, dum kiu prof. Otto Haszpra prezentos superrigardan prelegon. Unua Ĝenerala Kunsido: Kadre de la pritrakto de la Estrara Raporto, Probal Daŝgupto donos pluan perspektivon.

lundo 25:

Je 14h00 en salono Szerdahelyi kunvenos ĉiuj, kiuj volas diskuti pri la kongresa temo. Mallonga klarigo pri la labormetodo. Disiĝo en kvar laborgrupojn pri diversaj aspektoj. Tiuj grupoj rekonvenos **mardon** kaj **ĵaŭdon**.

vendredo 29:

Dua Ĝenerala Kunsido. Resuma prezento de la eldiskutaĵoj.

Tago de la Lernejo

La Tago de la Lernejo, organizita de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), komenciĝos lundon je la 9h00 kaj daŭros ĝis 12h00 en la salono Grabowski. La posttagmeza kunsido okazos de 14h00 ĝis 16h30 en la salono Hodler. La diskuttemo estos: la ĝustaj formoj de la lerneja politiko koncerne la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejojn.

Antaŭtagmeze estos mozaiko de diversaj raportoj pri la evoluo de la Esperanto-instruado (i.a. la unua intensiva metodika kurso en La Chaux-de-Fonds, la Lerneja Projekto, la realigo de video-kasedoj kun modellecionoj, lastaj oficialaj atingoj en Britio kaj GDR, evoluo de Esperanto en Sovetunio, Afriko, Azio, la 22-a ILEI-Konferenco en Kerkrade, la nova estraro de ILEI, demonstraj modellecionoj, k.a.

Posttagmeze, post enkonduko pri la kadro-temo ĝenerale, diskutgrupoj interŝanĝas ideojn pri la sekvaj subtemoj:

- Strategiaj problemoj kaj agadprincipoj rilate al la ĉeftemo.
- Kie ni komencu? Kiuj regionaj kaj landaj grupoj donas la plej bonajn perspektivojn?
- Kiuj personoj kaj instancoj estos informataj?
- Kiuj informigaj dokumentoj estos prezentataj kaj pro kiuj motivoj? Kion proponi?
- Pedagogia preparado: Kiel trejni la instruistojn, prepari la lernilojn, k.s. antaŭ, dum kaj post la alpaŝo.


En ĉiu grupo estos gvidanto kaj protokolanto. Ĉi-lastaj notos la ĉefajn ideojn kaj ilin reraportas poste en la pleno.

SALUTON EL ĈINIO

稿 紙

稿 紙

稿 紙



ESPERANTO-ASOCIO DE HUAAN FUJIAN ĈINIO

La 26-an de julio 1988

Adreso: poŝt-kesto: 363804

L.I. GUANGHUI (Vicprezidanto)

Esperanto-Asocio de gubernio HUAAN
de provinco FUJIAN de Ĉinio

GRATULETERO

Al la 73-a Universala Kongreso de Esperanto
kara estraro de la Kongreso
kaj reprezentantoj

kaj ĝemikoj, kaj ĝesamideanoj

Hodiaŭ la 73-a UK de E okazas en Nederlando.
Tio estas la granda revuo pri la Internacia EM
estas la bonega ŝanco de la diverslandaj spertoj

esperantistoj por vaste kontakti profundigi komprenon, akceli amikecon, interŝanĝi spertojn, por tio ni sendas al vi plej varman gratulon esprimas nian sinceran intiman saluton alla diverslandaj reprezentantoj el la tuta mondo.

La kongreso estis alte taksita de la internacia publiko. Dum la pasintaj cent jaroj, miloj da homoj ellernis E-on k uzis ĝin kiel komunikilon je individua bazo. E-o konstante pruvis sian valoron kiel bonega perilo de interkomprenigado inter popoloj k kulturoj k grave kontribuas al mondopaco. Sub la gvidado de la UEA ke la disvolvado de internacia EM fariĝas glata pli k pli. Ni kara UEA faris k faras grandan kontribuon al ĉina EM k internacia EM k interkompreniĝo k kunlaboro k paco. Amikeco de la tuta homaro.

Nun EM estas viva k prospera, por tio UEA havas grandajn kontribuojn, ĝi estas la plej bona E-Asocio en la tuta mondo iliaj prezidanto.

Vicprezidanto k tuta membro de UEA. Ili frontas estantecon kun pli memfido ol ili estas elmantranta en la pasintaj jaroj. Ni sentas ke niaj koroj estas tiel firme kunigitaj ke nenio en la mondo povos nin disigi. Ili estas la plej bonaj homoj en la tuta mondo. Ili estas niaj plej karuloj. Ni estas ja kvazaŭ fratoj, oni dankis la prezidanton de UEA pro lia energia laboro diligente al internacia EM homoj apartenas al ilin sukceso kronos iliajn penadojn. Ni ĉiuj estimas k respektas ilin.

per E-o por amikeco k paco!

plena sukceso al via kongreso!

Bonfarton k agrablon alla reprezentantoj

La Solena Inaŭguro

Laboro kaj ĝuo — jen du vortoj ofte aŭditaj dum la duhora kongresa malfermo, dimanĉe ekde la 10-a horo en la kongresa salonego. Pri ĝuo jam ne ekzistis dubo: En la minutoj antaŭ la enmarŝo de la podianoj, la dumilvoĉa konversaciado elradiis kontenton kaj partoprenemon. Pri laboro oni devas atendi antaŭ ol juĝi, sed certe ne mankis instigado al ĝi flanke de diversaj parolantoj.

Laŭ la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, temas pri pilgrimado ĉi tien — hejmurbo de la esperantistaro. Temas ankaŭ pri kongreso de planado, “kiu povus esti nekutime fruktodona”. Tiuj, kiuj ĉeestis en Varsovio antaŭ unu jaro, certe sentas tiun ĉi UK pli intima kaj, iusence, pli serioza. Tonkin substrekis la ŝancojn dumkongrese aktivaj, ĉu pri la kongrestemo, ĉu pri la agado de UEA, ĉu pri aliaj eroj. La Unua Ĝenerala Kunsido de UEA, la ferma Festo de la Jubileo marde kaj la iniciatoj de la Bjalistoka Centro plue indas je amasa partopreno.

Ankaŭ Ans Bakker-ten Hagen parolis pri laboro, sed ĉi-foje je la flanko de la Loka Kongresa Komitato. Ŝia teamo, kuntirita el ĉiuj anguloj de la lando, pretas ĉion fari — “Nur la veteron ni ne diktas.” La aludo al la sabata fulmoŝtormo ridetigis multajn vizaĝojn.

Pli seriozis UEA-estrarano Ottó Haszpra en sia enkonduko de la kongresa temo, “Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo”. Li tuŝis la neceson miksi saĝon kaj amon en onia aliro al la mondo, esprimo “iom bombasta sed esence prava”. El tio sekvas la ligoj inter scienco kaj kompreniĝo, kun inda eĉ esenca rolo de internacia neŭtrala lingvo en tiu kompreniĝo. Pli vasta uzo de Esperanto tiucele altigus ĝian reputacion ekstere, kaj evoluigus la lingvon mem interne de la komunumo. El amaso da dumkongresaj diskutoj, d-ro Haszpra esperas vidi kreski finan rezolucion pri tiu interrilatado.

Post prezento de la podianoj venis la bela harpa interveno de Saskia Veen kaj transiro al la tradiciaj salutoj. Inter la ĉeestantaj Honoraj Membroj bedaŭrinde mankis aŭstralia eksambasadoro Ralph Harry, kies meritoplenan vivlaboron por internacia kompreniĝo rekonis la dua Premio Deguĉi (simbole transdonota ĉe la Oomoto-kunsido lunde). TEJO, la junulara sekcio de UEA, povis raporti pri la Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo kun 729 homoj el 46 landoj, kaj faris tion el sub la ombro de tre bela vakera ĉapelo.

“Se ni estas efektive amika rondo, ni komencu per saluto de organizo, kiun oni ofte konsideras nia konkuranto.” Tiel la ĝenerala direktoro de UEA enkondukis spritan saluton de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu substrekis la multajn komunajn inter SAT kaj UEA — sed ankaŭ emfazis, ke diverseco estas esenca trajto de vivsistemoj.

Diversecon certe montris la kvardeko da salutoj el diversaj landoj — kaj ankaŭ la stilo de la salutoj. Aŭstrio menciis, ke la Viena Radio plilongigis sian E-elsendon. Zairio ligis Esperanton kun la batalo kontraŭ rasismo. Usono raportis 35%-an kreskon en sia membraro, dum Burundio kvazaŭ pardonpetis pro sia movada malgrandeco. Norvegio leĝere vortludis pri la vetero. Angolo kaj Italio verve alvokis al vigla agado. Inter la landoj frapis kelkaj nomoj preskaŭ nekonataj, kaj estus malfacile ne dividi la senton de Tonkin, ke “nia movado fariĝas pli kaj pli tutmonda.”

Simila penso estis nur unu el multaj en la ferma festparolado de d-ro John Wells. Tiun nekutime konversacian tekston, kiu tuŝis plurajn unikaĵojn de la nuna kongreso kaj la nuna jaro, ni redonas sube.

Festparolado de d-ro John Wells

ESTIMATA PREZIDANTO, ESTIMATAJ GEKONGRESANOJ:

Vi aŭdis jam multajn salutojn, kaj estas ja konvene en la inaŭguro de Universala Kongreso, ke oni salutu. Tiuj salutoj estis direktitaj al vi, al la kongresanoj. Mi nun volus saluti en kelkaj aliaj direktoj.

Unue mi volas saluti la urbon Roterdamo. Profesoro Tonkin jam nomis ĝin nia hejmo. Mi havis pli anatomian nomon por ĝi: ĝi estas la umbiliko de la Esperanto-movado, ĉar tie estas nia Centra Oficejo. De la LKK ni aŭdis ke ĝi estas la fokuso de internacia komunikiĝo. Vere, ĝi estas la krucvojo de Eŭropo, ĝi estas grava havenurbo, ĝi estas milionurbo, ĝi estas urbo detruita en la milito kaj tamen fenikse rekonstruita.

Do, mi salutas nian kongresurbon. Mi salutas ankaŭ unu el ĝiaj filoj: mi salutas Erasmon. Li vivis antaŭ kvarcent jaroj, estas vere. Sed li estas tamen ia modelo de sciencisto, de klerulo kun internacia kompreno. Li estis botanikisto, sed li estis ankaŭ klerulo kiu kapablis editorojn gravan novan eldonon de la greka Nova Testamento. Li estis monaĥo, li estis pastro. Li estis profesoro, kiu ne restis en tiu ĉi lando; li estis profesoro en Kembriĝo, en Anglio. Li estis profesoro en Bazelo, ĉe la svisa landlimo. Do li estis internacia homo, kaj pro tio oni prave nomis la premion Erasmo pro elstaraj kontribuoj al internacia kompreno...

Mi salutas ankaŭ la landon Nederlando, lando kiu havas fortan komprenon pri sia propra nacieco, kiu longe batalis por sendependiĝo, kiu havas brilan historion. En la 17-a jarcento ĝi estis mondpotenco finfine, kaj okupis gvidan rolon en la komerco, en la arto, en la scienco, kaj havis sian grandan imperion orientan kaj okcidentan. Poste ĝi elĉerpiĝis pro militoj. Fine ĝi estis

Hejmeco

karakterizis la Solenan Inaŭguron, kaj atendeble restos kongresa trajto tra la venontaj tagoj. Ne nur ĉar multaj el ni sentas nin hejmaj en ajna loko, kie oni parolas Esperanton — ĉu en najbara domo, ĉu milojn da kilometroj for de la gepatra lando. Temas ankaŭ pri tio, ke Roterdamo ja estas iu simbola hejmo de la esperantistaro — eĉ pli ol Varsovio, ĝia naskiĝloko. La kaŭzo de tio, la CO de UEA, volonte ricevos vian viziton, pere de la koncerna giĉeto, dum la venontaj tagoj.

LA INAŬGURO: JAM AŬDITA EN TUTA EŬROPO

La unua sonraporto pri la Inaŭguro, sendita per radiokablo al Varsovio, estis sekve ankoraŭ samtage aŭdigita, la unuan fojon je 17h00 dimanĉe kaj poste trifoje. Aparte en Pola Radio oni aŭdigis la tutan preskaŭ 20-minutan festparoladon de prof. J. Wells. Kvankam la kongresa raportisto de Radio Polonia — ĉefredaktoro A. Pettyn — multfoje sendos sonmaterialon al Varsovio, por laŭeble vaste raporti pri la kongresaj aranĝoj, samtempe li kolektas diversajn sonscenojn, intervjuojn kaj eldirojn, kiuj estos prezentitaj en la aŭtuna periodo.

PLIA PLAĈAĴO DE NEDERLANDO

Oni diras: sidigu lin en la unuan vicon, kaj li aplaŭdos kion ajn. Mi sidiĝis en la kvinan. Tamen dum la Nacia Vespero estis multaj momentoj, kiam ne aplaŭdi estus nur snobece.

Tenero, mildo kaj kvieto, kiun elradiis la pianludado de flandra artisto Geert Dehoux, bone harmoniis kun antaŭimagoj pri Nederlando, kiel regno de akvo, floroj kaj trankvilo. Similan etoson kreis ankaŭ la kantoj, plenumitaj de M. Angelova (Bulgario), G. Staneŝnikova (Sovetio), kaj harpo-baritona duopo S. Veen kun A. de Ruyter. (Cetere, iliaj koncertoj viziteblas lunde kaj ĵaŭde.)

Iom aparte staris danc-poemo, animita de N. v. d. Eekhout. Taksu ĝin mi tute ne kompetentas, sed laŭ kelkaj spektintoj, tiu ero estis tre sukcesa.

Sendiskutan bonvenon de la ĉeestantoj ricevis ĉarmaj malglatadoj de la spektaklo, kaŭzitaĵoj, cetere, de la “longaj kruroj kaj manoj”, kiujn, laŭ klarigoj de S. Pilger, (mis)ŝancis havi unu el la koncertintoj.

Tamen, ĉu ni eltrovis ĉi-foje ian perlon? Mi kredas, ke jes. Ĝi nomiĝas “Kajto”, konsistas el kvar profesiuloj kaj amatoroj, kaj karakterizeblas per jena fakteto. Tuj post la koncerto iu el la spektintoj venis al la ensemblanoj kun la deziro aĉeti dekon da iliaj diskoj kaj kasedoj (kiuj fakte ekzistas en la nederlanda lingvo). Do, ni atendu nian vicon kaj dume ĝuu la ĵusan malkovron de plia nederlanda plaĉaĵo en la gastiga lando.

RAPORTO-DISKUTO FIASKAS

Tre solena, digna omaĝo al elstaraj forpasintaj movadanoj — Drees, Lapenna, Neergaard, Denoël, Isobe, Szerdahelyi — kaj konciza, pensiga prezento de la kongresa temo fare de d-ro Probal Daŝgupto, tamen ne sufiĉis por tute sukcesigi la Unuan Ĝeneralan Kunsidon de UEA. Ties tradician ĉeferon — la publikan diskuton de la Estrara Raporto pri la pasinta jaro — oni devis ĉesigi je nur la 5-a ĉapitro (el 16) pro manko de tempo. La Komitato devos reveni al ĝi post la fino de la Kongreso; bedaŭrinde tio ne eblis por la publiko.

AŬTOROJ SUBSKRIBAS

Marde en la Libroservo, la jenaj aŭtoroj-eldonistoj ĉeestos por subskribi siajn librojn:

10h00-12h00
Ulrich Lins
(*La danĝera lingvo*)
15h00-17h00
Juan Régulo-Pérez
(precipe Stafeto-libroj)

DU GULDENOJ POR DU-SEMAJNA FERIADO EN BIALISTOKO

En la kongresejo (apud la salono-Hodler) troviĝas giĉeto Bialistoko, kie estas aĉeteblaj memoraĵoj kaj informiloj ligitaj kun la naskiĝurbo de Zamenhof kaj kun la projekto **Monda Esperanto-Centro**. La tuta monsumo, kiun oni kolektos per la vendado de ĉi tiuj varoj eniros la konton de la Fondumo Ludoviko Zamenhof, kiu celas konstruigi la Centron. Inter la vendataj objektoj aparte rekomendindaj estas memormedaloj, grafikaĵoj pri Bialistoko kaj speciala plene esperantlingva kongresa numero de *Kurier Podlaski* (Bialistoka Kuriero) kun loterio, per kiu oni povas gajni du-semajnan feriadon en Bialistoko. La plenigitajn kuponojn de la loterio oni kolektas en la giĉeto Bialistoko kaj ĉe la fino de la kongreso okazos publika lotumado de la ĉefpremioj. Kaj do, aĉetante per du guldonoj la gazeton, oni havas la ŝancon gajni belan premion kaj viziti la naskiĝurbon de Zamenhof.

EKUMENA DISERVO OKAZIS BUNTE KAJ AMASE

Ĉirkaŭ kvincent gekongresanoj el diversaj kristanaj konfesioj partoprenis dimanĉe posttagmeze la ekumenan diservon en la ĉefpreĝejo de la kongresa urbo. Male ol en sama okazo lastjare en Varsovio, ĉi-foje la ceremonion konkludis kaj riĉigis la komuna disdonado de pano kaj vino — sankta komunio por la rom-katolikoj, sankta manĝo por la evangeliistoj. Gvidan linion al la komunaj kantoj donis la impona orgeno de Laŭrenspreĝejo, en kies forta voĉo foje preskaŭ dronis la timemaj esperantaj vortoj de la nekutimiĝintaj ĉeestantoj. Ĉiu alveninto ricevis ĉe la enirejo libreton kun la detala programo kaj vort-post-vorta disvolvigo de la diservo, tiel ke ĉiu okazaĵo estis klara por ĉiuj: ĉar antaŭ la asembleo parolis pluraj plurdevenaj geesperantistoj, kaj ne ĉiam la oreloj sukcesis alkutimiĝi sufiĉe rapide al novaj voĉmuziko kaj prononc-maniero. En tiu ĉi bunta kadro predikis pastorino Jelly Koopmans-Schotanus, el Roterdamo mem, pri la temo “Honoraj emblemoj aŭ cikatraj diademoj?” La titolo resendis al la fundamenta kristana mesaĝo, ke ĉia vera homa honoro estas nur atingebla luktante kontraŭ homaj suferoj kaj maljustecoj.

KONGRESA KURIERO, DUA NUMERO (LUNDO)

Novaj aliĝoj

N-roj 2200-2209 aperos en venonta numero de la Kuriero. Ni petas pardon pri iuj misliterumadoj, kiuj ŝuldiĝas al foja neeblo legi ies manuskribon.

- 2210 Dinnel, S-ino Julie. Usono.
2211 Meyers, S-ro Roland. 65, rue de la scierie, L-3279 Bettembourg, Luksemburgio.
2212 Odorici, S-ro Viterbo. Via Pazzano, 41028 Serramazzone MO, Italio.
2213 Lezak, D-ro Tadeusz Adam. Zubrzyckiego 3c/6, PL-45262 Opole, Pollando.
2214 Szenasi, S-ro Sándor. Hungario.
2215 Dvorszky, S-ro László. Hungario.
2216 Nowak, Alicja. Pollando.
2217 Sági, Ren. Hungario.
2218 Sági, Vil. Hungario.
2219 Hofstätter, S-ro Gottfried. Aŭstrio.
2220 Lange, S-ino Gisela. 81-853 Sopol, Wiedpodlegiosci 692/65, Pollando.
2221 Lange, S-ro Zygmunt. Sopol 81-853, Wiedpodlegiosci 692/65, Pollando.
2222 Faludi, D-ino Mária. 3300 Eger Arany János 20, Hungario.
2223 Rolandus, S-ro L. Johan. Nederlando.
2224 Kazakov, S-ro Radosvet Nikolaev. Str. Latinka No. 6 Blok 43 Eniro A, Sofio 1113, Bulgario.
2225 Jantzen, S-ino Barbara. 23, rue du Beau-Site, F-57520 Alsting, Francio.
2226 Jantzen, Heidrun. 23, rue du Beau-Site, F-57520 Alsting, Francio.
2227 Li Wei, S-ro. No. 88, 34 Dong 205 Sushe Datonggu Shenyang, Ĉinio.
2228 Li Changduo. No. 1, 1 Duan Tajshanlu Huanggugu Shenyang, Ĉinio.
2229 Geng Tengdong, S-ro. No. 1, 1 Duan Taishanlu Huanggugu Shenyang, Ĉinio.
2230 Phillips, S-ino Sally. 23, Milward Road, Hastings, TN34 3RP Anglio.
2231 Bauzá Phillips, S-ino Daniela. 23, Milward Road, Hastings, TN34 3RP Anglio.
2232 Bauzá Phillips, F-ino Arleta. 23, Milward Road, Hastings, TN34 3RP Anglio.
2233 Kostova, Galja Vasileva, S-ino. Bulgario.
2234 Topál, Lászlóné. Hungario.
2235 Vejkeyné, Sarolta Sudan. Hungario.
2236 Kostova, Galja Vasileva. Bulgario.
2237 Brenander, S-ino Birgit. Bergsgatan 28, 112 23 Stockholm, Svedio.
2238 Vd Oever, S-ro Ed. Treilerstr. 11, NL-1784 SW Den Helder, Nederlando.
2239 Vd Oever, S-ino Marianne. Treilerstr. 11, NL-1784 SW Den Helder, Nederlando.
2240 Rohde, D-ro Joachim. Parkstr. 69, Berlin-Weissensee, DDR-1120, Germana DR.
2241 Welling, S-ro Hans. FR Germanio.
2242 Bruilliaire, Muriel. 785 rue Las Sorbes, 34000 Montpellier, Francio.
2243 Grasso, S-ro Luiz Antonio. Rua Oscar Freire 1814 Apto 11, Brazilo.
2244 Mol, S-ino Catharina Alicea. Erasmusweg 847, Hago, Nederlando.
2245 Trnka, S-ro József. Csolnok, Erdősor 10, 2521, Hungario.
2246 Trnka, S-ro Zoltán. Csolnok, Erdősor 10, 2521, Hungario.
2247 Trnka, Annamaria. Csolnok, Erdősor 10, 2521, Hungario.
2248 Blońska, Anna-Maria. Pollando.
2249 Balint, Roža. Petőfi Sándor u. 62, YU-25222 Telečka, Jugoslavio.
2250 König, S-ro Daniel Johannes Eduard. Schwarzwaldstr. 47, 6800 Mannheim 1, FR Germanio.
2251 Komrij, Sjoerd G. Nederlando.
2252 Komrij, Y. M. Nederlando.
2253 Connell, S-ro Richard. Usono.
2254 Przeździak, S-ino Ewa. ul. Darłowska 5^a 14, 04-091 Warszawa, Pollando.
2255 Widera, S-ino. 41-500 Chorzów, ul. Szczecińska 31, Pollando.
2256 Kowalczewski, S-ro Adam. 34-115 Łódź, Falista 166/26, Pollando.
2257 Malgorzata, S-ino Mirowska. 95-073 Grotniki, Ustronie 35, Pollando.
2258 Fiutak, S-ino Edita. 80-451 Gdansk 6, Kościuszki 5/3, Pollando.
2259 Kőnyves, S-ro Zoltán. Hungario.
2260 Kőnyves, S-ino Deñes. Hungario.
2261 Kőnyves, S-ro Zoltán. Hungario.
2262 Dörr, S-ro Josef. D-6607 Quierschied, Querstr. 11, FR Germanio.
2263 Opoka, S-ro Włodzimierz. Str. Luzycka 65/13, 30-658 Krakow, Pollando.
2264 Majewski, S-ro Stanisław. Str. Komandosov 5E/4, 30-334 Krakow, Pollando.
2265 Marasek, S-ro Tadeusz Dariusz. Str. Monte Cassino 11m144, 01-121 Varsovio, Pollando.
2266 Stouthart, S-ro Roland. Ruys de Beerebroucklaan 37, 6417 CC, Nederlando.
2267 Bacskaí, D-ro István Lajos. Arpádfejedelem 40, H-1174 Budapest, Hungario.
2268 Apaolaza, S-ro Ioseba Inaki. Gazteizko Iribidea 47 6m Eyk 01008, Hispanio.
2269 Gauna, Inaki. Domingo Beltran 42-4, C.P. 01012, Vitoria-Gasteiz, Hispanio.
2270 Ortega, S-ino Blanca Emilia. C/ Beato T. de Zumarraga No. 22 - 4^o, 01008 Vitoria, Hispanio.
2271 Garcia Fernandez, Consuelo T. C/ Nieves Cano No. 8, 2^o dcha, 07006 Vitoria, Hispanio.
2272 Agoston, S-ro Albert. Fehervari ut 121, H-1119 Budapest, Hungario.
2273 Piotrowski, S-ro Ladislav. Ĉeĥoslovakio.
2274 Dragonová, S-ino Terezia. Ĉeĥoslovakio.
2275 Vargova, S-ino Margita. Palárikova 1, 04001 Košice, Ĉeĥoslovakio.
2276 Spoelder, S-ro Wim Nicolaas. Merwedeplein 58, 1078 NG Amsterdam, Nederlando.
2277 Rudolf, S-ino Annelies. FR Germanio.
2278 Ribbius, M. Nederlando.
2279 Klein, S-ro Peter. Schifferstadter Str. 1, 6704 Mutterstadt, Germanio.
2280 Harakawa, S-ino Takako. 8-8 Kashiwabara Sayama-shi, Saitama-ken, Japanio.
2281 Kobayashi, S-ro Ichinosuke. 1-29-18 Simoigusa Suginamiku, Tokio, Japanio.
2282 Kobayashi, Nobu. 1-29-18 Simoigusa Suginamiku, Tokio, Japanio.
2283 Bacev, S-ro Marin. P.K. 1054, 1000 Sofia, Bulgario.
2284 Hofmann, Nadi. FR Germanio.
2285 Mika, D-ro J. Andrić. Ul. Yovana Stojavljevića 37/2, 11.186 Beograd, Jugoslavio.
2286 Goffart, S-ro Benoît. Place du Grand Sablon 34, B-1000 Bruxelles, Belgio.
2287 Cwik, S-ro Michael. Avenue de Tervuren 175, B-1150 Brussel, Belgio.
2288 Koštović, S-ro Haris. Džemala Bijedica 276, 71000 Sarajevo, Jugoslavio.
2289 Karlović, S-ino Nada. Krašička 10, Zagreb, Jugoslavio.
2290 Mulas, S-ino Maria Antonia. Via Lorejo 6, Bergamo, Italio.
2291 Knappert, S-ro Jan. Britio.
2292 Edelenbos, S-ino Carla. Nederlando.

eĉ okupita en la nuna jarcento. Nun ĝiaj kolonioj sendependiĝis, kaj ĝi devis serĉi novan rolon, kaj trovis novan rolon, kaj estas, mi dirus, ankoraŭ denove en gvida rolo en la mondo, gvida pozicio en la scienco, en la tekniko, en la moderna mondo. Ĝi estas lando, kiu devis batali kontraŭ la maro, ĉu ne? La nederlandanoj pli-malpli inventis la teknikon krei digojn por forbari la maron kaj ŝanĝi la maron en teron, ŝanĝi la dunojn en fruktdonajn kampojn, ŝanĝi la sablejojn en florgardenojn.

Pli frue la maro estis por la nederlandanoj malamiko. Oni povus diri, ke la maro plendigis la nederlandanojn; sed la nederlandanoj plen-digis la maron, kreis plenajn digojn, tiel ke nun ĝi estas amiko.

Nederlandano estas ankaŭ la hejmo de unu el la plej gravaj evoluoj en la scienco kaj tekniko en rilato al la lingvo-problemo; ĝi estas la hejmo de BSO, kie oni evoluigas la sistemon DLT por maŝintradukado pere de la uzo de Esperanto kiel interlingvo. Post la brila inspiro de inĝ. Witkam kaj lia sukceso persvadi la firmaon entrepreni seriozan esploron en tiu kampo, li sukcesis atingi ke nun tiu projekto DLT estas en pinta pozicio almenaŭ el la vidpunkto de la eŭropa strebado pri la maŝintradukado. Mi ne scias, kion faras la japanoj — eble ili unue atingos la merkaton. Aŭ eble ne. Sed certe, mi ne hezitus diri, ke en Eŭropo la projekto DLT estas en la pinta pozicio. Kaj ĝi ja aplikas Esperanton en tute praktika maniero, kvankam tio estas maniero kiun Zamenhof certe ne pripensis, kaj kiun multaj el ni trovis surpriza en la komenco. Nun du jaroj da eksperimentado montris ke la projekto estas praktika; oni plene testis prototipon de tradukado inter la angla kaj la franca; kaj tio havas ankaŭ gravan signifon por la evoluigo de Esperanto, ĉar finfine oni devas tute precizigi Esperanton por ke ĝi ludu tiun rolon, kaj tio povus esti utila al ni ĉiuj.

Do, mi salutas la urbon, mi salutas la landon; mi volus saluti ankaŭ la mondon. Ni vivas en rimarkinda momento en ties historio. La politika situacio en la nuna momento estas miraklo. Ĉu vi rimarkis, ke en 1988 eksplodis paco en la mondo? Kaj mi ne aludas al la fakto ke SAT estas reprezentata en kongreso de UEA. Ne: Usono kaj Sovetunio — la grandpotencoj — faris interkonsenton forigi mezdistancajn nukleajn raketojn. Tiu estas la unua fojo ke oni konsentis redukti la nombron de nukleaj armiloj en la mondo. . . Tiu paco, kiu eksplodis, tamen, ne estas limigita al la akordo inter Usono kaj Sovetunio. En Afganio finiĝas la milito. En Irano, Irako oni akceptis la rezolucion de UNO por batalĉeso en la Golfo. En Angolo oni atingis akordon inter Sud-Afriko kaj Kubo kaj aliaj. La vjetnamianoj forlasas Kamboĝon. Tio estas tuta modo kaj tendenco kiu estas vere esperiga. . . Ni eble fine trovis ke en la moderna mondo la milito estas ne plu gajnebla; kaj kian perspektivon tio donas por Esperanto!

Ĉar restas dume la lingvoproblemo: la homaro estas ankoraŭ dividita per siaj diversaj lingvoj. Ni ne havas la eblecon rekte komuniki unu kun la alia, sen ke unu estu en supera kaj alia en suba pozicio, aŭ ke ambaŭ baraktas per fremda nacia lingvo. . . Fine, do, mi salutas Esperanton. Mi salutas la lingvon, tiun etulon de 1887, bebo kiu kreskis ĝis tio, ke en la pasinta UK en Varsovio ni povis havi 6 000 homojn kune kiuj komunikis facile, glate, unu kun la alia per ĝi. Homa lingvo, nek maŝina lingvo nek kodo: En la epoko de informadiko, de elektronika redaktado kaj tiel plu, la bezono de komuna homa lingvo restas. Nia lingvo evoluis, kiel ĉiu normala lingvo. Ni raciigis ĝin kaj precizigis ĝin. Ni vidis, kiel ni povas ekspluati ĝiajn kaŝitajn kapablojn. La sendependigo de la afiksoj, la kreo de novaj adverboj, kiaj ne ekzistas en eŭropaj lingvoj, la rektaj verboj, la ekspluatado de tiuj eblecoj. Ni evoluigis nian vortprovizon por esti adekvata al la bezono de la moderna mondo. Ni ankoraŭ havas niajn etajn diskutojn pri multaj el tiaj punktoj, kaj tio donas al ni bonan amuzon dum niaj kongresoj, foje. Sed la esenco, la kerno estas, ke Esperanto estas lingvo kapabla transpreni la rolon por kiu ni celas, ke ĝi estu uzata.

Esperanto do estas lingvo, kiu havas firman socian bazon. Vi estas ĝi, vi kaj ĉiuj esperantistoj. Se mi aŭ kiu ajn alia individuo havas la ideon ŝanĝi Esperanton — mi ne scias kiel, enkonduki amase novajn vortojn, ŝanĝi la gramatikon, ŝanĝi la prononcon — mi ne povas. Neniu el ni povas. Ĉar vi, ni, la granda socia portanto de Esperanto estas la bridantoj, la bremsoj, la garantio por vera lingvo, kaj pro tio Esperanto estas lingvo kaj ne projekto. Pro tiu socia bazo.

Tio signifas, ke mi salutas ankaŭ la esperantistojn. . . Mi salutas do la veteranojn. Mi salutas la spertajn esperantistojn. Mi ankaŭ salutas la komencantojn. Kaj speciale mi volas saluti tiujn, kiuj nun ĉeestas sian unuan Universalan Kongreson. Vi povas mem sperti tiun miraklon, kiun ĉiu el ni spertis siatempe, ke Esperanto ne estas ia teoriaĵo, kiun ni penis studi hejme el libroj aŭ en malgrandaj kursoj. Ĉi estas realaĵo. . . Nia tasko estas konvinki la mondon, ke nur per Esperanto — kiu estas samtempe facila por la lernanto, kaj neŭtrala inter la diversaj partioj kaj partianoj — nur Esperanto povos fine tiel solvi la lingvan problemon.

ANONCETOJ

Priskribo de **urbaj promenoj** — mallonga (2,6 km, komenciĝante ĉe la stacidoma placo) kaj longa (6 km, daŭrigo de la unua) — estas haveblaj ĉe la Informejo.

* * *

Ekspozicion pri la kongresa temo vi trovos en la vestiblo antaŭ la Libroservo.

* * *

Kurso pri ĉina gimnastiko **Taj-ĝi** okazas en la granda halo Faulhaber je 8h30 matene kaj 18h00 vespere.

* * *

La **internacian ekspozicion de UEA** (35 loj) vi trovos ĉe la garderojoj ambaŭflanke en la granda halo Faulhaber. Se vi deziras pruntepreni ĝin, demandu ĉe la ĝiceto UEA.

* * *

La **Internacia Esperanta Ĥoro** ekfunkcias denove. La ĝeĥoranoj kolektiĝas ĉiutage ĉe la enirejo je 09h00, kaj poste je 16h00.

* * *

La revuo **Scienca Mondo** traktas multajn interesajn problemojn pri diversaj fakoj de la scienco. La aŭtoroj estas mondfamaj profesoroj. Abonu jam dum la kongreso! (UEA peras la abonon.)

Vi povas aŭdi la sistemon **Esparol** ĉiutage antaŭtagmeze aŭ posttagmeze en la kongresejo, sur la unua etaĝo. Temas pri komputilo, kiu parolas Esperante kaj instruas Esperanton por komencantoj. Se vi mem volas paroligi vian komputilon, vi povas akiri la sistemon. Venu al la demonstro kaj kontaktu Ilona Koutny. Precizaj horoj estos afiŝitaj en la kongresejo.

* * *

Du afrikanoj bezonas senpagan veturigon post la Kongreso: Mramba Simba al Saint Nazaire, Francio, kaj A.E. Foley al Fakse, Danlando. Se vi volas helpi, bonvolu kontakti ilin pere de la mesaĝtabulo aŭ kunordiganto Hans Bakker.

* * *

Esperantisto, kial heziti? SCIO forigu mal-lertecon en kontaktoj kunhandikapitoj. Ĝue legu

1) *Ne tiel sed ĉi tiel* — por agrablaj kontaktoj kun blinduloj.

2) *Ĉu ne eblus ĉi tiel?* — kun move handikapitoj.

3) *Trans la sonizolan muron* — kun surduloj kaj surdblinduloj.

Prezo po f2,10 de la Libroservo. Esperanto por tutmonda solidareco.

IKU EKAS:

Tonkin spontane pri la Esperanta literaturo

Lastmomente antaŭ la malfermo de la 41-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, evidentiĝis ke William Auld — la unua preleganto — ne povis veni pro malsano. La prezidanto de UEA mirakle trovis tempon el ŝtopita tagordo, venis, kaj postlastmomente la rektoro, prof. Jan Knappert, ankaŭ aperis. Ties inaŭgura parolado interalie memorigis nin, ke antaŭ dudeko da jaroj neniu interesiĝis pri la araba lingvo, sed ke nun oni instruas ĝin en la universitatoj. Kaj li krome instigis la esperantistojn verki librojn kaj gvidi kursojn pri filozofio, scienco, poezio, io ajn altkvalita. Finfine, eĉ se ne baldaŭ, la mondo interesiĝos.

Kie Auld estus parolinta pri la Esperanta poezio de la lastaj dudek jaroj, Tonkin alprenis pli vastan temaron: la komenco kaj esenca karaktero de nia literaturo, tradukita kaj originala. Li lokis la naskiĝon de Esperanto en internaciisma kunteksto. Iom poste li komparis ĝin kun la eksplodo de stelo, kiu okazas pro la samtempa ĉeesto de certaj fizikaj kondiĉoj, sed poste vastiĝas laŭ la propraj leĝoj. En la unua stadio de tiu vastiĝo, gravan rolon havis Antoni Grabowski, "la patro de la Esperanta poezio". Grabowski faris la unuan beletran tradukon en Esperanto, *La neĝa blovado*, ekpaŝante kun nur 900 vortoj. Kvankam liaj kelkaj originalaj poemoj estas malaltnivelaj, liaj postaj tradukoj — precipe *El Parnaso de popoloj* kaj *Sinjoro Tadeo* — estis majstroverkoj ege gravaj por la juna lingvo. Grabowski ankaŭ havis la celon ligi la esperantistojn al monda kulturo. Kaj laŭ Tonkin, certaj nunaj tendencoj — aparte la neologisme obsedata beletra skolo — eble montras timon antaŭ la definitiva tutmondiĝo de la Esperanta kulturo.

Wells en Okcidenta Azio

D-ro John Wells, la konata fonetikisto kaj lingvisto, gvidis la IKU-aŭskultantojn tra la lingva mapo de Okcidenta Azio lundon matene, substrekante la kulturan kaj historian gravecon de tiu aŭ alia lingvo aŭ skribsistemo, ekzemple la gravecon de la fenicia alfabeto kiel la prapatro de ĉiuj alfabetoj de la mondo. "Kristanoj, hebreoj, kaj mahometanoj / ni ĉiuj de Di' estas filoj," diris Zamenhof; Wells atentigis pri la graveco de la okcidentaziaj lingvoj, en kiuj estis verkitaj la unuaj dokumentoj de tiuj gravaj monoteismaj religioj. Lige kun la hebrea, li tuŝis ankaŭ la lingvoplanan aspekton de la revivigo de la hebrea en Palestino kaj poste la ŝtato Israelo, kaj la similecon de tiu lingvoplana agado al la lanĉo de la Esperanta parolkomunumo. Lige kun la araba, Wells deskriptis la fenomenon *diglosio* (kiun, en sia atentinda verko *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, li nomis "duidiomeco"), kiu konsistas en tio, ke unu lingvo havas (ofte laŭregione varieman) parolan formon kaj norman skriban formon uzatan por celoj pli oficialaj, ofte iom malsaman ol la parola formo.

Máthé pri limoj al aeraj poluaĵoj

El ĉiuj prelegoj kadre de IKU, certe la prelego de Árpád Máthé — doktoro pri kemio el Budapeŝto — plej kongruis al la kongresa temo. La preleganto tuŝis la problemon de defendo de la naturo kontraŭ kemia poluado. La verbo *tuŝi* estas uzita tute intence, ĉar la temo estas tiel vasta kaj grava, ke oni ne povis preparoli ĝin pli profunde dum la kongresa prelego. Tiu koncentriĝis ĉefe je poluado de la aero-medio, kiu neglektas ĉiujn limojn faritajn de la homoj kaj moviĝas kiel esperantistoj. Ĉefaj fontoj de aeraj poluaĵoj estas produktado de energio kaj aŭtado. Ĝuste ili liveras al la aero plej grandan parton de diversaj kombinaĵoj de karbo, nitrogeno, sulfuro kaj pezaj metaloj. Tre klare kaj kompreneble, eĉ por nefakuloj, doktoro Máthé prezentis damaĝojn kiujn kaŭzas la kombinaĵoj al la ekvilibro ekzistanta en la naturo. Por ke ni ne restu tute senesperaj, li ankaŭ menciis nunajn metodojn, kiuj permesas forigi la poluaĵojn, kaj ĉefajn direktojn, en kiuj iras la energioavida mondo kaj scienca mondeto provanta ripari tion, kion ĝi mem fuŝis antaŭe. La temo vere kaptis la atenton de la aŭskultantaro, ĉar post unuhora prelego sekvis preskaŭ kvardekminuta diskuto, eĉ disputo. Do certe ĉiuj lasis la salonon konvinkitaj pri la graveco de la problemo, kiu ŝajnas minaci ne nur al niaj idoj sed jam ankaŭ al ni mem.

Laco

en la CO estas sufiĉe konata fenomeno, kaj verŝajne ankaŭ vi mem spertas ĝin post la streĉoj de Bankedo kaj Balo. Nu, merkredo donos okazon por malstreĉiĝo, eble ankaŭ al nia redakcioto. Jam sufiĉis la longaj noktoj kaj malmulta dormo! ... Se en ĵaŭdo vi reaktiviĝos, pensu iom pri ni, kaj lasu artikolojn kaj raportetojn ĉe la Informejo.

Dankon, kaj dormu bone!

NOVAJ PROGRAMEROJ

mardo 26:

Grabowski 18h30-19h30: koncerto de la sovetiaj artistoj Staneŝnikova kaj Puŝova, famaj profesiuloj kiuj prezentos varian programon al vi.

ĵaŭdo 28:

Hodler 9h00-17h00: programsinsekvo en la Esperantologia Konferenco: prelegoj de Pool, Pennacchiotti, Daŝgupto, Schubert.

Zamenhof 15h00-16h00: koncerto fare de la bulgaraj kantistinoj Angelova, Kostova, Adamova, akompanataj de s-ino Puŝova el Sovetio. Popular-klasika programo.

Drees 16h00: Hermann Behrmann prezentos la novajn librojn eldonatajn de la Paderborna E-Centro. Oni parolos pri karavano al Kubo en 1990 kaj pri la Analiza Skolo.

Grabowski 18h00: pupteatro *Dekamerono 8,5* (ne vendrede kiel en la Kongresa Libro).

vendredo 29:

Grabowski 12h30-13h30: Koncertos por vi la ĉefaj kantistinoj Smyčka kaj Vích, kiuj havos akompanion plane fare de la sovetia pianistino Puŝova.

Uitterdijk 16h00: kunveno de la Kvakera Esperantista Societo (KES). Ĉiuj gekongresanoj estas bonvenaj.

Cseh 15h00-16h00: S-ino Kimie Markarian (824) donos klarigon kaj lecionon pri la *sorobano*, kalkulilo daŭre uzata dum 450 jaroj en Japanio kaj aliaj aziaj landoj. La pupteatro *ne* okazos vendrede je 17h30, sed je 18h00 ĵaŭde (vidu supre).

NUN HAVEBLAS ĈE LA LIBROSERVO:

Mefisto

2½-hora streĉa artfilmo, Esperante dublita en Hungario, kiu gajnis antaŭ kelkaj jaroj la prestiĝan Oskarpremion. En nazia Germanio, talenta aktoro metas karieron super politikon, kun katastrofaj sekvoj.

Haveblas ankaŭ **En Eŭropo ie** (nigra-blanka klasikaĵo debutinta en Varsovio) de la sama dublo-entrepreno. Detaloj kaj prezoj ĉe la Libroservo.

ANKORAŬ LOKOJ EN POST-KONGRESA MUZEA EKSKURSO

Ĉu vi kredas muzeojn tedaj kaj ĉiam samaspektaj artejoj? Jen ŝanco ekkoni ilian varion: la domo, en kiu Rembrandt kreis siajn majstroverkojn; la domo, kie Anne Frank skribis sian taglibron; unu el la plej belaj naturkonservejoj de Nederlando, kun mirinda ekstera statuparko; vitro-muzeo kun unikaj vitraj skulptaĵoj — kaj pluraj aliaj. Ĉio ĉi eblas dum vi daŭre loĝas en Roterdamo ĉe via kongresa hotelo. Kontakti la giĉeton Ekskursoj!

AŬTOROJ SUBSKRIBAS

Ĵaŭde en la Libroservo, la jenaj aŭtoroj ĉeestos por subskribi siajn librojn:

10h00-12h00
Ulrich Lins
(*La danĝera lingvo*)

15h00-17h00
Gaston Waringhien
(PIV, PAG, *Eseoj*, ktp)

ANTOLOGIAJ LANĈOJ

Marde, inter 12h00 kaj 12h30, okazas ĉe la Libroservo la oficiala prezento de du novaj kaj luksaj verkoj. La unua estas krome nova ero en la prestiĝa UEA-Unesko-serio Oriento-Okcidento. Temas pri **Aŭstralia antologio**, redaktita de Alan Towsey, kiun prezentas UEA-prezidanto Humphrey Tonkin, kaj **Itala antologio**, redaktita de Giordano Azzi, kiun prezentas akademiano Aldo de' Giorgi. Ambaŭ volumoj aperis ĉe la itala eldonejo Edistudio, kies estro Bruĉjo Kasini same ĉeestas. Sekvas gustumado de italaj vinoj.

PLIA BONO EL BIALISTOKO

La Bialistoka Pupteatro prezentos sian *Dekamerono 8,5* ankoraŭ du fojojn: kiel antaŭvidite mardon je la 17-a kaj — bonvolu atenti tagon kaj horon de la lasta spektaklo, ĉar ili ambaŭ ŝanĝiĝis — ĵaŭdon je la 18-a. La scenejoj kaj nemultajn sidlokojn gastigas salono Hodler (kaj ne la tro granda salono Grabowski, kiel anoncas la Kongresa Libro). En tre mallarĝa spaco dum preskaŭ horo kaj duono proksimas spektantoj kaj aktoroj en italeska etoso inspirita de verkoj kaj personoj el la 14-a jarcento. La teatraĵo tiras sian temaron de kvar rakontoj el la novelaro de Bokaĉo. Precipe impresis la polajn aŭtorojn de la teksto la famo de *Dekamerono* kiel kolekto de maldecaj anekdotoj: fakte, ĉio, kio okazas sur la scenejo havas eksplicitan rilaton kun seksaj aktivecoj, en la nomo de naturo, kio certigas la transdaŭron de la homa specio per tiom agrabla rimedo.

Kapturnige la voĉoj de la aktoroj venas jen rekte el iliaj buŝoj, jen el la scenej-malantaŭo, kaj la pupoj — ĉar ja temas pri pupteatraĵo — ekestas en la plej genie simplaj manieroj. Jen do ŝak-figuroj moviĝas tra la fenestroj kaj pordoj de vertikala ŝak-tabulo. Jen fruktoj iĝas kapoj kaj gantoj iĝas vestaĵoj de tuta familio el patro, patrino, filino kaj... amoranto de la filino. Jen elementaj pupkapetoj alkroĉitaj al la aktor-brakoj, kun manikoj kiel vestaj ornamoj, okazigas la aventuron de ĝuema triopo. Kaj daŭre la aktoroj sukcesas per siaj manoj kaj voĉoj kaj movoj samtempe ĉeesti kaj forgesigi sian pupistan rolon en senhalta sinsekvo de eltrovoj kaj surprizoj.

Cetere, ni esperantistoj jam alkitimiĝis, ke bonas kio venas el Bialistoko...

KONGRESA KURIERO, TRIA NUMERO (MARDO)

ANONCETOJ

Ĉiun vesperon je la 19.30 horo, la **mondaj novaĵoj en Esperanto** estas aŭskulteblaj en la unua etaĝo (galerio) de la kongresejo.

Parolantoj de pluraj lingvoj bonvolu anonci vin ĉe d-ro Julius Balbin (345). Li intencas fondi **Internacian Poliglota Societon**, kies embria klubo jam laboras en Nov-Jorko.

S-ro Mafuta-Wina (2139, Zairio) deziras enskribiĝi ĉe oksemajna kurso por komencantoj por plibonigi sian scion je la meza kaj supera niveloj, kaj tiel serĉas helpon pri faciligo de obteno de la sveda vizo. Li bezonas invitleteron ĝisdatigitan de aŭgusto ĝis oktobro 1988 aŭ plu.

Atentu! Estas esplorata ebleco eldoni en Esperanto popularan semajnan multpaĝan gazeton **Moskvaj novaĵoj**, kiu ĝis nun aperadas en rusa, angla, franca, hispana kaj araba lingvoj. Oni komencis ĝin eldoni ankaŭ en la germana, estas planata hungara versio ktp. Ĉi estas unu el la plej interesaj sovietiaj gazetoj. Por eldoni ĝin en Esperanto necesas havi tre grandan eldonkvanton. Respondeculoj de landaj E-asocioj estas petataj komuniki al P. Jegorovas (1273) maksimumajn kvantojn de la gazeto, kiuj povas esti abonitaj en iliaj landoj. Antaŭdankon!

Ĉu vi jam vidis la novan libreton pri **Roterdamo, Erasmo kaj la Biblio?** Ĝi estas senpage havebla ĉe la budo de Internacia Biblio-Misio. Estas la sesa jaro, en kiu IBM elmontras Biblio-studkursojn kaj literaturaĵojn pri la Biblio. Estas anoj de IBM en 55 landoj, kaj korespondantoj en preskaŭ ĉiuj landoj. Ĉe la budo elmontriĝas ekzempleroj kaj afiŝoj.

Ĉiu, kiu kapablas utiligi IBM-kongruan komputoron, kunlaboru por rapide realigi la projekton de **trilingvaj elektronikaj vortaregoj**. Mi demonstras sur eta komputoro kiel fari tion. Utiligu vian liberan tempon dum la kongreso. Vi trovos min en la Libroservo, kie oni vendas la **Esperantan Bildvortaron**. R. Eichholz (1383), Terminologia Centro de ISAE.

LSG (**Ligo de Samseksemaĝ Geesperantistoj**) havos sian oficialan kunvenon en la loka geja centro, Schiedamsesingel 175, merkredon la 27-an ekde la 20.00-a horo. La salono estos malferma ekde la 19.30-a horo. Interesitoj kiuj ĝis nun mem ne estas membroj, estas same bonvenaj.

Ekde la 7-a de aŭgusto, **Radio Havano** (Kubo) havos regulajn dimanĉajn elsendojn en Esperanto. La programon redaktos Orlando Raola González. Horoj kaj frekvencoj troveblas ĉe la kuba tablo sur la unua etaĝo de la kongresejo.

Amase aliĝas kongresanoj ĉe la budo de la **74-a Universala Kongreso**, kiu okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1989 en Brajtono (Brighton), Anglio. Eĉ se vi ne decidus tuj, nepre vizitu la ĝiĉeton por preni la belan Unuan Bultenon.

Brilflava varbilo haveblas de la tablo **Amik' en Afrik'** ĉe la unua etaĝo. Temas pri utila kaj instiga faldfolio, kiu donas rekomendojn pri korespondado, ĝemelado kaj donacoj al Fondaĵo Afriko. Prenu ĝin kaj eniru la kunlaborantaron!

Nek forgesu fari apartan viziton al la ĝiĉeto pri la **Bialistoka Centro**. Via du-guldena ĵeto povus gajni por vi tiujn du semajnojn en la zamenhofa naskiĝurbo. Vidu la duan numeron de la Kongresa Kuriero por plia informo — aŭ pli bone, iru kaj rekte parolu al la bialistokanoj mem.

KONKERO DE KASISTINOJ

Por malhelpi, ke la kasistinoj en la kongresa restoracia servo alparolu niajn kongresanojn en internacia lingvo alia ol Esperanto, oni aliris la direktoron kaj sub-direktoron de la servo, por konvinki ilin ke eblas post nur kelkminuta kurso majstri la Esperanto-numerojn kaj la bazan vortaron de la kelneristiko kaj kasistinistiko. Ili promesis transdoni la liveritan vortaron al siaj deĵorantinoj. Sed ĝis nun, laŭ profundaj kaj sciencnivela esploro, tio ne rezultis en signifa modifo de la bufeda interkomunikado. Ni tial vokas al la kongresanoj afable, firme kaj eĉ pedagogie intertrakti kun la bufed-kasistinoj en Esperanto.

ĈU NI ESTU FIERAJ PRI NIA JARLIBRO?

Lunde posttagmeze, dum pli ol unu horo, deko da delegitoj kaj ĉefdelegitoj vigle protestis kontraŭ la bedaŭrinde multaj eraroj aperitaj en Jarlibro 88: akuratajn ĝisdatigojn oni ne priatentis, ktp ktp... kaj tio ja levas principan demandon: Kiel akordigi la *akuratecon* de la Jarlibro kaj ĝian *fidindecon*? Ĉu la nunaj komputilaj programoj de UEA estas plibonigeblaj ĉi-rilate? Ĉu la ĉefdelegitoj rajtu relegi la presprovaĵojn ĵus antaŭ la apero de la Jarlibro?

Sed tiu longa debato pri kelkaj precizaj kazoj (ja gravaj fuŝoj, tamen...) ne lasis sufiĉan tempon por preparoli fundamentajn demandojn: Ĉu la nuna delegita regularo daŭre taŭgas, kiam la plimulto el la petoj koncernas loĝigon kaj korespondadon? Ĉu povas esti vicdelegito en urbo sen delegito? Ĉu ni limigu la nombron da fakdelegitecoj? Ĉu eblas forigi delegiton, kiu ne plu funkcias, kaj laŭ kiuj kriterioj? Ekzemple, ĉu ni ĝeneraligu la kutimon, ke delegito raportu ĉiujare al la ĉefdelegito, kiu rajtu forstrekii delegitojn ne respondintajn dum du aŭ tri sinsekvaj jaroj?

Iam funkciis komisiono de la Komitato de UEA pri la delegita reto, kaj ĝi komencis pristudi kelkajn el tiuj problemoj. Unu el la atingoj de tiu komisiono estas la mapoj, kiuj nun (preskaŭ regule aperas en la Jarlibro. Nun la situacio estas ne tre klara: kelkaj kritikoj estas ja evidentaj, sed ne estas evidente, kiel solvi la problemojn estonte.

Pro tio estas ege dezirinde, ke la delegitoj kaj kongresanoj ne nur kritiku la Jarlibron, sed faru pozitivajn, konstruajn proponojn, por ke en plej baldaŭa estonto ni povu ja fieri pri la utileco kaj fidindeco de nia Jarlibro.

Francois Lo Jacomo

KONGRESANTA KOLEGARO EL BIALISTOKO

La 73-an UK partoprenas delegacio de Bialistoko, en kiu troviĝas interalie vicvojevodo J. Slezak, urbestro Z. Zdrojewski kaj prezidanto de la Bialistoka Kultursocieto J. Jaworski. Krome ĉeestas la prezidanto de la Bialistoka Filio de PEA, St. Dobrowolski, kiuj en interparoloj kun kongresanoj kolektas praktikajn ideojn pri la funkciado de la estonta Monda Esperanto-Centro. La unuajn internaci-skalajn E-aranĝojn en Bialistoko oni planas organizi jam venontjare.

EKSPOZICIO DE ĈINAJ PENTRAĴOJ



国画特展

Pentristo: Tian Wei (kongresa n-ro 2034)
Datoj: ĝis la 30-a de julio inkluzive
Loko: Kongreso "De Doelen"

EKOLOGIO KAJ NEŬTRALECO

Ĵaŭdon la 28-an de julio je 14h00 en salono Bulthuis okazos publika diskutkunveno pri la propono de Germana Esperanto-Asocio amendi la Statuton de UEA. La propono celas aldoni plian esencan kondiĉon por la laboro de UEA (krom bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj): nome, la respekto de la ekologiaj bezonoj kaj necesoj. Ĉar tiu amendo ŝanĝus la kutiman interpreton de la neŭtraleco de UEA, nepras kiel eble plej vasta diskuto pri ĝiaj meritoj. Ĉiuj do estos bonvenaj aŭdigi sian opinion en la kunveno, kiun gvidos Ian Jackson, ano de la Komitata komisiono taskita ekzameni la proponon.

CENT STAFETO-LIBROJ VENDATAJ

Ne antaŭe anoncitaj, en tre malmultaj ekzempleroj, tiuj ĉi titoloj de la fama eldonejo Stafeto estas ekde lundo haveblaj en la Libroservo.

<i>Aventuroj de pioniro</i> Privat	f 18,00	<i>Koko krias jam!</i> Szilágyi	24,00
<i>La bapto de Caro Vladimir</i> Borovský, tr. Pump	24,00	<i>Kontralte</i> Boulton	30,00
<i>Eseoj 1 — Beletro</i> Waringhien	39,00	<i>... kun siaspeca spico</i> Schwartz	30,00
<i>La infana raso</i> Auld	30,00	<i>Maŝinmondo kaj aliaj noveloj</i> Szathmári	18,00
<i>Junaĝa verkaro</i> Privat	18,00	<i>Otelo, la maŭro de Venecio</i> Ŝekspiro, tr. Rossetti	30,00
<i>Kantoj kaj romanoj</i> (bindita) Heine, tr. Waringhien/Kalocsay	45,00	<i>Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud</i> Ribillard	18,00
<i>Kiel akvo de l' rivero</i> (bindita) Schwartz	45,00	<i>Zamenhof, aŭtoro de Esperanto</i> Boulton	39,00

LA INTERPAROLO DE MAŜINO KAJ HOMO

Jen pliaj detaloj pri la ĉiutagaj demonstruoj kaj IKU-prelego de Ilona Koutny (vidu p. 56 de la Kongresa Libro).

La **sistemo ESPAROL** funkcia sur mikrokomputilo povas eldiri iun ajn esperantan tekston kaj simple utiligeblas en instruado, por laŭtleĝado kune kun optika legilo, ktp. Tiun sistemon oni demonstras ĉiutage sur la unua etaĝo de la kongresejo.

Se temas pri la **rekonado** de homa voĉo, la saman frazon povas eldiri viro aŭ virino, infano aŭ maljunulo. Ili povas diri tion flustre aŭ kriante, rapide aŭ male kaj ni ĝenerale tamen komprenas tion; eĉ ni ofte rekonas la homojn el ilia voĉo. Kompreni la nevarian informon en la ŝanĝigantaj cirkonstancoj helpas al la homo la kunteksto kaj la sperto. Komputilo devas eliri el la fizika signalo, kiu ne difalpas al vortoj kaj sonoj. Pro tio la plej oftaj funkciaj sistemoj rekonas nur izolite diritajn vortojn sekure. Por ke multaj homoj povu utiligi la sistemon, necesas kompleksa referencaro aŭ modelo por la rekonadaj elementoj. La rekonado de flua parolo estas en esplora fazo; tie necesas segmenti la parol-signalon al sonsimilaj elementoj.

La **instruado** estas homa rilato inter la instruisto kaj la lernanto(j). Komputilo ne volas anstataŭigi la instruiston, sed kompletigi ties agadon. Ili ebligas memstaran lernadon, ekzercadon, ripetadon per similaj taskoj kaj objektivan prijuĝon.

La grafikaj eblecoj povas "kolorigi" la lecionojn; ludoj povas amuze instrui la materialon. La sintezita parolo, ankoraŭ malofte uzata, certigas pli homan komunikadon inter la lernanto kaj la maŝino, kaj en la lingvoinstruado ĝi povas ekzerci la komprenon, ortografion, ktp.

Por la informinterŝanĝo de malsamlingvaj homoj, servas ofte la **tradukado**. Eĉ sen komputilo demandiĝas, ĉu eblas adekvate traduki. Dum tiu kompleksa procezo transiras la informoj el la elirlingva informo al la cellingva. La esenco devas esti konservata ĉe la traduko de informivaj tekstoj — al tio aspiras maŝina tradukado.

La plursenceco de lingvoj aperas en ĉiuj ŝtupoj (fonetika, sintaksa, semantika). La komputila sistemo, kiu procedas laŭŝtupo, sen la kompreno de la situacio, bezonas regulojn, kiuj priskribas la lingvajn rilatojn kaj vortaron, kiu enhavas signifojn, regojn kaj ĉirkaŭaĵojn de vortoj.

Esperanto povas plenumi la rolon de minimuma lingvomodelo kun sia regula gramatiko kaj pli difinebla semantiko. Tiel ĝi povas peri informojn kiel interlingvo en maŝina tradukado.

Por pliaj detaloj, ĉeestu la IKU-prelegon 9, jaŭde je 17h00 en Hodler.

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ (AIS) SAN MARINO

- salutas la partoprenantojn de la 73-a UK kaj aparte la docentojn kaj aŭskultantojn de la 41-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato.
- invitas al sia 5-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 5), okazonta 1988-08-27/09-05 en la Respubliko de San Marino. (La programo estas havebla en la Libroservo.)
- petas fakulojn pri aŭtomata lingvo-pri-traktado kaj interlingvistiko apogi per preleg-ofertoj aŭ per partopreno en la diskutoj la unuan AIS-konferencon en la BENELUKS-landoj, okazonta 1988-10-14/16 en Enpen.
- kuragiĝas ĉiujn finstudintojn de ĉiuj fakoj, kiuj komprenas la internacian lingvon kaj ankoraŭ ne apartenas al la Internacia Sciencista Kolegato (ISK) de AIS, en-registriĝi en ties elektronikan datumaron per konigo de nomo, fako, adreso, kaj eventualaj sciencistaj gradoj al KN 1759.

Helmar Frank
Prezidanto